

## Burgoj kaj kasteloj

Jarcentoj da kulturaj mirindaĵoj atendas vian malkovron. Brno apartenas al regiono Suda Moravio, kun la plej granda nombro da burgoj kaj kasteloj en la lando. Vin atendas noblaj kasteloj, belegaj palacoj, funkciaj vilaoj. Nepre vizitindas UNESKO-heredaĵo Lednice-Valtice areo, nomata ankaŭ "Ĝardeno de Eŭropo", aŭ plia UNESKO Monda Heredaĵo: Vilao Tugendhat - perlo de Funkciisma arkitekturo. Kaj multe pli! La elekto estas ege riĉa, malfacilos viziti ĉiujn vidindaĵojn - sed vi provu!

uk.esperanto.net/2025

## Kiel alveni?




La urbo Brno estas facile atingebla aŭte, buse, trajne, samkiel per aviadiloj. La urbo havas propran flughavenon kaj aldone proksimas tri pliaj: Prago, Vieno, Bratislavo. De la ĉefurbo Prago oni atingas ĝin aŭte en du horoj, buse aŭ trajne en tri.

## Listo de perantoj

Ĉu vi trovas malfacilecon mem aliĝi kaj pagi al la 110-a UK? UEA disponas je listo de perantoj, kiuj povas helpi vin en diversaj mondopartoj. Vidu la liston: https://uea.org/alighoj/perantoj

ĈEA

uea
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

BRNO CONVENTION BUREAU

Fotoj: Centro de turismo - Suda Moravio (Centrála cestovního ruchu - Jižní Morava)

110-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO • BRNO 26.7.-2.8.2025

# UNUA BULTENO

**BRNO, ĈEĤIO, 26.7. – 2.8.2025**

KONGRESA TEMO

**Esperanto kaj teknologioj**
**kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj**



uk.esperanto.net/2025

# Brno, Ĉeĥio

Brno estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio, kun facile atingebla internacia flughaveno, kio ebligos senprobleman aliron por partoprenantoj el la tuta mondo. La urbo ankaŭ havas bonan publikan transportan sistemon kaj la kongresejo situas proksime al ĉiuj gravaj hoteloj kaj turismaj allogaĵoj. Brno estas ĉarma kaj historie riĉa urbo.
Ĝi ofertas varman kaj akcepteman etoson kaj unikan atmosferon. Turismaj vidindaĵoj kaj gastamo de la homoj certe plaĉos al la partoprenantoj de la 110-a UK.








# Mirinda arkitekturo

Por admirantoj de arkitekturo, Brno estas vera mirindaĵo. La urbo estas diversa, surpriza kaj ĉarma. Dum vi promenos tra Brno, vi trovos mezepokan kastelon, preĝejojn kaj katedralojn, palacojn, la pionirajn verkojn de moderna arkitekturo kaj same la urbosiluetajn konstruaĵojn de la estonteco. La ĉefa dominanto estas la bela Katedralo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, situanta en la urbo-centro sur la tiel nomata Petrov-Monteto. La urbo povas surprizi vin eĉ subtere - ekz. pere de siaj katakomboj kaj la ostejo - la dua plej granda en Eŭropo.



# Folkloro kaj vino







Atendas vin pluvivanta folkloro kaj popol-tradicioj:  Moraviaj tradicioj estas spektaklo-riĉaj: bunta dancado, bela muziko, kostumoj, aldone elstara vino kaj bongusta manĝaĵo. La tuta regiono de Suda Moravio estas famega pro siaj bonaj vinoj - certe do planu partoprenon en iu el la ekskursoj al vinfare-joj aŭ ĉeeston en la vingustumado! Ja pli ol 96% de vinejoj en Ĉeĥio situas en Suda Moravio. Muziko, arkitekturo, gastronomio, vinfarado - ĉie tie senteblas kunigo de la tradicio kun la modernaj teknologioj kaj nuntempeco. Regiono ankaŭ estas paradizo de biciklantoj - kun 1200 km da vinvojoj.

